



**MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"**

**INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS**

**Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16**

## MALNOVAJ PAĜOJ

### DEFALINTA FOLIO

De trunketo disigita  
Vi malgaja, sekigita  
Kien iras, folieto?  
"Vento kverkon ruinadis,  
Kiu min sur si tenadis;  
Tiam, tute fordonanta  
Min al vento forfluganta.  
Mi trakuras en momento  
Valon, monton, kun la vento;  
Kaj en tiu ĉi movado  
Mi vojaĝos sen timado  
Kun folio de la rozo,  
Kaj folio de la laŭro  
En la tuta vivodaŭro!"

(Trad. COSTA e ALMEIDA).

### GRANDA SPACO

(EL W. WACKERNAGEL)

Spacon havas mi sen limo  
Por konstruoj en aer'  
Por amego en animo  
Kaj por tombo en la ter'.

A. KOFMAN.

Eltirita el «Lingvo Internacia» n.º 2.º februaro 1893.

## TRAGEDIA AMHISTORIO

(Daŭrigo)

Sur la malriĉa sed pura lito kuŝis viro kies aĝo estis malfacile komprenebla, siaj haroj estis grizaj kaj sia sveninta vizaĝo montris la proksimecon de la morto.

Mario rigardis lin kaj ŝia koro, ŝi ne sciis kial, ekbategis.

La kuracisto diris al Mario, ke ŝi ne malproksimiĝu ĉar antaŭ, ol du horoj la malsanulo mortos. Mario demandis:—Kiam venis tiu ĉi viro?

—La du nevoj de la vilaĝestro trovis lin sur la planko de la vojo proksima al la vilaĝo tute sveninta kaj portis lin tien ĉi, respondis la kuracisto.

—Kaj, ĉu oni scias kiu estas lia nomo?

—Ne, sed bonvolu vi mem serĉi inter liaj vestaĵoj ĉar eble portas li iom, kio povas sciigi nin kiu li estas.

Mario serĉis kaj reserĉis inter la ĉifonaj vestaĵoj de la malsanulo, sed ŝi trovis neniom kio povus klarigi lian devenon. Kiam ŝi revenis apud la lito, la malsanulo moviĝis kaj malfermis siajn okulojn per refermi ilin denove por ĉiam. Mario kovris la bruston de la mortanto per la litotukojn, tiam el lia ĉemizo falis malgranda pakajo, kiun Mario prenis kaj rigardis avide; ŝia koro batis fortege dum ŝiaj manoj portis la pakajeton, finfine ŝi ĝin malfermis kaj ŝi trovis tie... ŝian propran portreton, poste ŝi trovis tiun portreton de la patrino de Antono kaj poste ŝi jam ne povis vidi plu ĉar ŝi falis sveninta sur la korpon de la mortanto.

Kiam la kuracisto eniris en la ĉambron restis tute surprizita ĉar sur la mortinta korpo de la nekonatulo kuŝis ankaŭ mortinta Mario.

La kuracisto vidis sur la planko la portretojn kaj interne de la pakajo li ankaŭ trovis fermitan leteron sur kies koverto li legis la jenajn: "Por doni al F-ino Mario B. kiu loĝas sur la vilaĝo A".

La kuracisto, kiu estis tre maljuna kaj tre bone konis la malfeliĉon de ambaŭ geamantoj, baldaŭ komprenis la veron de la okazintaĵo sed por klarigi bone la aferon rompis la koverton kaj legis la leteron, kiun Antono skribis per Mario.

La leteron diris tion ĉi:

"Karega Mario!"

Mi ne scias ĉu mia mano povos fini tiun ĉi leteron ĉar mi estas terure malforta.

Antaŭ kelkaj jaroj malamika soldato vundis min kaj tute sveninta oni min portis ĉe malamika malliberejo, tie mi pasigis teruregajn jarojn, poste iu mia kunmalliberulo kaj mi atingis forkuri el la malliberejo dum niaj zorgantoj dormis trankvile pro drinkado.

Ni petis almozon kaj rakontis nian pasintaĵon en la unua vilaĝo, kiun ni atingis, sed la regantoj de la popolo demandis en la militaj juĝejoj pri

nijaj nomoj kaj oni diris al ni ke ni estis mortintaj, tial kvazaŭ ni estus mizeraj trompantoj eĉ niaj sampatrujanoj estigis nin denove en la malliberejo dum kelkaj tagoj.

Finfine, mia amiko mortis antaŭ kelkaj tagoj pro mizero kaj nun kiam mi estas tre proksime al vi, miaj dolorigitaj kruroj ne permesas al mi marŝi plu.

Tial ke la morto baldaŭ min vizitos mi volas skribi ĉi tie mian lastan penson.

Mi faras al vi du petojn:

Faru ke miaj gepatroj ne sciu pri mia morto, ke ili ĉiam havu la esperon min revidi, kaj vi kiu estas tiel bona zorgu pri ili, kiel vi ĉiam faris.

La alia peto estas tiu ĉi:

Edziniĝu kiel eble plej baldaŭ, nasku filojn kaj lernigu ilin malami militbatalojn. Kara Mario! Tiu ĉi estas mia lasta volpenso, plenumu ĝin mi tute kore petas al vi. Mi volas ke de vi naskiĝu raso kiu lernigos la popolojn malami batalojn.

Adiaŭ! Ke vi trovu feliĉon kaj sciuj, ke mi mortas pensante pri vi kaj pri miaj gepatroj.

Via Antono.

Originale esperantverkita

PILAR SALVO GONZALEZ.

## Al mia tre estimata samideano S-ro Ravelino Sevilla

Kiam mi ricevis la oktobran numeron de la karega NIA VIVO, mi, kiel ĉiam, unue atentis pri la verkantoj. Mi vidis vian subskribon kaj mi ĝojis, ĉar mi rajtas ĝoji. Poste mi vidis, ke via artikolo estas al mi dediĉita kaj mi surpriziĝis, tial ke mi rajtas surpriziĝi, same kiel vi rajtas dediĉi al mi artikolon. Sed kiam mi legis, ke publike oni kvalifikas min "gramatika instruinto", mi malgajis, mi ankaŭ havas rajton al la malgajeco.

Mi, do, rajtas ĝoji, surpriziĝi kaj malgaji, sed mi ne rajtas kontraŭdiri vian tre interesan verkon. La direktoro, nia tre neutralama direktoro S-ro Bruquetas, ne volas, ke nia gazeteto estu tribunon por diskutado eĉ se ĝi estas plene amikeca, sed ke la revueto, estu nur ilo por helpi celante ke, same kiel okazis ĉe la latina lingvo pri kio Hispanujo estis el la unuaj landoj, Esperanto havu en la hispana popolo bonegajn belestrikistojn. Li plej saĝe agas. Mi esperas vidi lin en altaro kun granda verda stelo enajlita sur la kapo, kvazaŭ krono, montrante ekzempleron de la eksterordinara numero de NIA VIVO, same kiel Mozeo havas en siaj manoj la tabelojn de leĝo.

Mi, antaŭ multe da tempo ne vidis vin; sed via artikolo elmontris al mi ke vi estas tia sama esperantista, kiel ĉiam. Pro tio mi ĝojis. Mi tute ne atendis vian dediĉon. Tial mi surpriziĝis, kaj mi malgajis, ke mi ne estas "gramatikulo".

Jes, mi, por instigi la fratecanojn, instruis en nia klubo hispanan gramatikon kaj aliajn konojn, kaj mi estas preta, samcele, lernigi ilin ludi violonon aŭ salti; por Esperanto mi estas kapabla eĉ iri kun la kapo malsupre.

Sed jen la paradokso; mi nek scias pri gramatiko, nek estas aŭdinda eĉ ludante la sonorilon; kaj miaj kruroj, mi nescias ĉu pro la dekvin jaroj da edzeco, estas tiom malfortaj, ke mi ne saltas eĉ legante la "laŭdojn", kiujn S-ro Mangada dediĉas al mi.

Pro tio vi ne devis nomi min "gramatika ins-

truinto" sed "instruinto pri gramatiko". Samkaŭze, mi ne povus nomi iun: "ŝtona laboranto", el timo, ke li ĵetu al mi la laborŝtonon.

Kaj nur tiam la paradokso estos ne "verega vero", kiel vi diras, sed nur "vero", ĉar vero ne povas esti granda nek malgranda, same, kiel ne povas ekzisti duona malvero sed duono de malvero; pro samkaŭze la numeralo tri ne povas estis triego nek trieto, sed nur tri.

Ĉu vi min pardonas? Tio estas nur unu el niaj tiamaj interbabiladoj, ĉu gramatikaj? ĉu pri gramatiko"?

José ORÓS.

## POSTENA FORLASO

La suno ĵus levigis, kiam la malgranda, ventrodika varpoŝipo, aŭ pli ĝuste, vaporbarko, Bulldog, preterpasis la dormantan urbon Gravesend rapidante laŭ eĉ ses nodoj ĉiuhore.

Sur ĝi okazis iam da malkonsento dum la veturado inter la ŝipanoj kaj la maŝinisto, kiu malsupre, en sia malpura kaj eta maŝinejo, karboŝo velis en la fornon propramane kaj faris ĉion alian necesan.

La ŝipanaro, konsistanta el ŝipestro, piloto kaj ŝipknabo, kiuj unufoje veturis profesie sur vaporŝipo kaj estis translokitaj lastmomente en ĝin el sia velbarko Sorĉistino, trovis la malagrablaĵon, ke la maŝinisto, kiu ne supozis ekveturi tiel frue, estis terure kaj kulpe ebria.

Ĉiun momenton, kiun li povis ŝpari el sia maŝino, li uzis por eligi la supran korpoparton tra la malgranda enirejo de sia ĉambraĉo kaj ekdisputi kun sia ĉefulo.

—He, barkisto!—li kriis ekaperante kvazaŭ marioneto, el surprizskatolo post mallonga militĉeso.

—Ne atentu pri li—diris la piloto.—Li kunportis botelon da brando tien, malsupren, kaj estas duonfreneza.

—Se mi konus ion pri tiuj malbenitaj maŝinoj—grumblis la ŝipestro.—Mi irus tien kaj rompus lian kapon.

—Sed vi konas nenion—diris la piloto—kaj mi ankaŭ ne, do, preferinde estas, ke vi restu kvieta.

—Vi pensas, ke estas grava persono—daŭrigis la maŝinisto ĉar staras tie ludante tiun radeton.

—Vi opinias, ke la tuta laboro estas plenumata de vi. Kion la knabo faras? Sendu lin ĉi tien por karboŝoveli.

—Iru malsupren—diris la ŝipestro furioze, kaj la knabo obeis malvolonte.

—Vi supozas—diris la maŝinisto kvazaŭ ludante dramon post, kiam li batis la kapon de la knabo kaj kaptinte lian nukon ĵetis lin surplanken—vi supozas, ke, ĉar mia vizaĝo nigriĝis, mi ne estas homo. Estas multaj oleomakulitaj vizaĝoj, kiuj kaŝas bonan koron.

—Mi pensas nenion pri tio—grumblis la ŝipestro—faru vian laboron kaj mi faros tiun mian.

—Ne respondu min—kriegis la maŝinisto—ĉar mi ne bezonas tion.

La ŝipestro levetis siajn ŝultrojn kaj ŝanĝis rigardon kun la al li simpatianta piloto.

—Atendu ĝis, kiam ni estos en tero.

—La kaldrono estas tute eluzita—diris la maŝinisto reaperinte post, kiam li estis rapide malaperinta malsupren.—Ĝi eble krevos en iu ajn momento.

Kvazaŭ por konfirmi ĉi tiujn vortojn teruraj bruoj venis el malsupre.

—Tio nur estas la knabo—diris la piloto—li estas timigita, kompreneble.

—Mi supozis, ke ĝi estis la kaldrono—diris la ŝipestro, spirante pli libere.—La bruoj estis sufiĉe laŭtaj.

Dum ili parolis la knabo eligis sian kapon for el la enirejo kaj, baraktinte furioze pro teruro sukcesis venke forkuri el la maŝinisto kaj atingi la ferdekon.

—Tre bone—diris la maŝinisto persekutinte lin sur la ferdeko kaj iris ŝancelante al la ŝiprando. —Mi sufiĉe rilatis kun vi.

—Ĉu ne estas preferinde, ke vi iru malsupren, apud vian maŝinon?—diris la ŝipestro.

—Ĉu mi estas via sklavo?—demandis la maŝinisto larmante.—Respondu min. Ĉu mi estas via sklavo?

—Iru malsupren kaj plenumu vian laboron, kiel saĝa viro—estis la respondo. Ĉe tiuj ĉi vortoj la maŝinisto perdis sian reston de prudento kaj sulkginte terure siajn brovojn demetis sian grasplenan jakon kaj jetis sian ĉapon sur la ferdekon. Tiam li eltrinkis la brandon, kiun li estis kunportinta kaj rigardis oblikve la riverbordon de Kent.

—Mi bezonas lavi min—li diris laŭte kaj sidiĝinte demetis siajn botojn.

—Iru malsupren, apud vian maŝinon unue—diris la ŝipestro—kaj mi sendos al vi per la knabo sitelon kaj sapon.

—Sitelo—rediris la maŝinisto malŝate, dum li iris al la ŝiprando—Mi lavos min multe pli dece.

—Lin detenu!—ekkriegis furioze la ŝipestro—Lin detenu!

La piloto ekkonsciinte la situacion sin jetis kapti lin, sed la maŝinisto kun laŭtaĉa ekrido metis siajn manojn sur la ŝiprandon kaj saltis en la akvon. Kiam li reaperis la ŝipo estis dudek metrojn malproksima.

—Veturu posten—kriis la piloto.

—Kiel mi povas veturi posten, se estas neniu ĉe la maŝino?—rediris la ŝipestro, dum li per la direktila rado devigis la ŝipon iri runde.—Pretigu ŝnuron.

La piloto tenante ŝnuron per sia mano, rapidis al la ŝiprando, sed liaj bonvolaj klopodoj malsukcesis pro la maŝinisto, kiu minacate de la ŝipkilo rekte iranta al li savis sian vivon per ĝustatempe enakviĝo. La vaporŝipo preterpasis lin.

—Reirigu ĝin runde!—kriis la piloto.

La ŝipestro jam faris tion, kaj en treege malgranda tempo la ŝipo, kiu estis irinta laŭ unu tuta rondo, revenis al la maŝinisto.

—Atentu la ŝnuron!—kriis avizante lin la piloto.

—Mi ne bezonas vian ŝnuron—kriaĉis la maŝinisto.—Mi iras borden.

—Venu surŝipen!—kriis per petega voĉo la ŝipestro, kiam ili alifoje preterpasis apud li—Ni ne scias regi la maŝinon.

—Veturu runde ree—diris la piloto—Mi kaptos lin per la boato. Ĝin proksimigu, knabo.

La boato, kiun trenis poste la vaporŝipo, estis proksimiĝata apud tiun ĉi kaj la piloto iris en ĝin sekvate de la knabo ĝuste, kiam la ŝipestro irigis la ŝipon laŭ alia rondo kaŭzante grandan indignon ĉe multego da grandaj kaj malgrandaj ŝipoj, kiuj volis pasi.

—He!—kriegis la mastro de trenŝipo, kiu estis

trenanta ŝipegon—Ne baru la vojon per via vaporŝipo. Nu! Kion vi faras?

—Fiŝkapti mian maŝiniston—respondis la ŝipestro, dum la ŝipo preterpasis apud la kilo de la alia kaj preskaŭ pereigis velbarkon, kies estro, ano de Salvation Army (Savarmeo), estis noble meditanta pri la perfektigo je sia animo.

—Kial vi ne haltas?—li kriis.

—Ĉar mi ne povas—ĝemis la ŝipestro de Bulldog, dum li serĉis vojon inter vaporŝipego kaj dumasta velŝipo, kiu por eviti la tujan kolizion trovis alian siavice.

—He Bulldog!—Vokis la piloto—Atendu por min ricevi. Ni jam kaptis lin.

La ŝipestro ridetis agonie, kiam li preterpasis persekutate de proksime de sia boato. La sentoj ĉe la aliaj ŝipanaroj, kiam ili sukcesis deflankiĝi de la vojo de Bulldog kaj preskaŭ enakvigis ĝian boaton kaj poste, evitante tion, preskaŭ koliziis kun io alia, ne povas esti esprimitaj per vortoj, sed kelkaj ŝipestroj lasis efiki sian elpensemon je tranĉvortoj treege sukcese.

—Fermu la veporeniron!—kriis la maŝinisto, kiam Bulldog ree preterpasis ilin—Malvigligu la fajron.

—Kiu do, regos la radon, dum mi tion faros?—kolere kriegis la ŝipestro lasante la radon momente por provi ĵeti la ŝnuron al ili.

Tiam la malkvieto en la rivero estis terura kaj la irado de la vaporŝipo, kiam ĝia estro denove runde veturis, io ja treege vidinda. Stranga manko de simpatio de la flanko de liaj fratoj, la ŝipestroj, pligrandigis liajn malfacilojn. Ĉiu ŝipanaro, kiun li preterpasis, diris ion al li, malgraŭ siaj multaj okupoj, kaj iliaj avertoj estis ĉiam tiel unutonaj, kiel insultantaj.

Fine, ĝuste, kiam li decidis lasi, ke lia ŝipo kuru laŭlonge de la rivero al la maro ĝis, kiam pro la malpliigo de la vaporforto la ŝipo haltos memvole, la piloto kaptis la jetitan ŝnuron, kaj Bulldog trenis rapide sian boaton altiritan apud la ŝipostajojn tiudirekten.

—Venu surŝipen, lunatiko!—diris la ŝipestro.

—Neniel antaŭ, kiam mi sciiĝos pri afereto—diris la maŝinisto, kiu estis sprita kaj jam tute resagiĝita de la banimpreso.

—Klarigu vian penson—diris la ŝipestro.

—Mi ne reiros surŝipen—, kriis la maŝinisto, ĝis, kiam vi, la piloto kaj la knabo ĵuros, ĉiuj kune, diri nenion pri ĉi tiu eta amuzaĵo.

—Mi denuncos vin tuj, kiam ni reiros teren—furiozis la ŝipestro.—Mi arestigos vin pro postenforlaso. Mi...

Kun decida gesto la maŝinisto provis sin ĵeti al la akvo, sed la piloto, kiu viglis lin, kaptis lian kolon kaj lin devigis resti sidanta.

—Venu surŝipen!—kriis la ŝipestro timigite de tia decido—Venu surŝipen, kaj mi nur faros vin batadi, kiam ni reiros teren.

—Ĉu nepre vere?—demandis la maŝinisto.

—Nepre vere—hore ripetis ĉiuj tri.

La maŝinisto venis surŝipen kun ĉiuj milithonoraj kaj rimarkinte, ke la akvo sentigas al ni malvarmon, kiam la stomako estas malplena, iris en la maŝinejon kaj ekvigligis la fajron.

Dum la vojaĝo li diris, ke ĉiuj frenezajoj, kiujn li faris, ne estis ja neutilaj, ĉar ili liveris la okazon vidi la belan ŝipkondukadon de la ŝipestro, dum la haoso, kaj asertis varme, ke ne estis en la tuta rivero alia vira kapabla fari tion.

Post ĉi tiu insida flataĵo la ŝipestra furiozo malaperis, kiel neĝo fandita de suno, kaj kiam ili fine venis en havenon, la ŝipestro tiel multe intencis batadi sian propran patron, kiel tiun simpatian maŝiniston.

El angla, tradukis

RAMON DE SALAS.

## Ĉu Esperanto estas vere praktika lingvo?

Pri tiu-ĉi afero, jam multfoje sukcese pruvita, mi deziras ankoraŭ insisti priskribante tion, kio okazis al mi dum mia vojaĝo al Hungarujo okaze de la efektiviĝo de la IV<sup>a</sup> Internacia Jamboreo.

Inter la hispanaj skoltoj estis ankaŭ antikva ĉefo de la Malagaj skoltoj, klerega persono kiu posedis kelkajn lingvojn. Liaj multenombraj vojaĝoj tra la tuta Eŭropo donis al li kelkan aŭtoritaton, kiam oni parolis pri lingvaj aferoj.

Kiam oni eksciis, ke mi estas esperantisto, konversacio venis nepre en tiun-ĉi aferon. Oni diskutis praktikan utilecon de Esperanto. Tiu sinjoro, kiun mi aludis, iam lernis Esperanton, kvankam mi povis rimarki ke li ne estis lerninta multon pri nia lingvo.

Foje li vojaĝis en Anglujon kaj dezirante uzi Esperanton, li parolis al la anglaj esperantistoj. Sed li povis kompreni preskaŭ nenion. Laŭ lia deklaro, la angla prononcado, ĉar estas tiel stranga al hispanoj, aliŝajnis la vortojn tiamaniere, ke li ne povis traduki kion oni parolis al li. Tio-ĉi estas, kion li deklaris. Sed responde al kelkaj demandoj miaj li ankaŭ deklaris, ke, ĉar li nesciis kelkajn ajojn pri la lingvo, estis ankoraŭ pli da malfacilo por interkompreniĝo.

Iam li estis entuziasma pri Esperanto. Sed post tiu-ĉi tago li ne plu konsideris Esperanton kiel la veran, internacian lingvon helpilon por ĉiuj. Mi provis konvinki lin, sed ne sukcesis. La diskutado interesis la aliajn skoltojn. Mi promesis al ĉiuj pruvi, ke Esperanto estas vere praktika kaj utila lingvo, dum nia restado for de nia lando.

Dum la efektiviĝo de la Jamboreo en Gödöllo, okazis la kunveno de Esperantistaj Skoltoj. La kvaran tagon de Aŭgusto, pli ol 200 skoltoj el 21 landoj kunvenis.

Tiun ĉi okazon mi elektis por finiĝi la diskutadon pri Esperanto. Mi invitis la ĉefon kaj la skoltojn viziti la Tendaron de esperantistaj skoltoj, kie oni efektivigis la kunvenon. Ili ĉiuj akceptis vole, interesitaj de mia persisto.

Venis hungaraj skoltfratoj por akompani min al la Tendaro. Kaj miaj samnacionoj, ĉiuj, komencis vidi, ke Esperanto ja estas utila. Ankaŭ mi iris kun estona skoltfratino. Illi ĉiuj miris, ke mi povas tute libere interparoli kun ŝi spite de niaj kontraŭaj lingvdevenoj. Fine ni eniris la Tendaron, kie estis multe da skoltoj el la plej diversaj nacioj. Mi advertis al miaj akompanantoj, ke malgraŭ la malsimilaj prononcadoj de ĉiuj, mi esperis interkompreniĝi kun ĉiuj. La ĉefo ridetis skeptike.

Tiam venis tio kion mi esperis. Ĉar mi estis (kaj estas) agento de Skolta Esperantista Ligo en Hispanujo, mi salutis la diversajn agentojn el aliaj landoj. Unue estis frato P. Balkany el Hungarujo, kiu montris al kara ĉefo, ke spite de niaj malsamaj prononcadoj en niaj gepatraj lingvoj, kiam ni estis parolante Esperanton, trovis ne-

nian malfacilon. Poste ankaŭ Halassy Rozey el Ĉeĥoslovakujo. Hans Thierbach el Germanujo. John Berggreen el Norveglando. Y. Tarabout el Francujo. Francis Sampath el Trinidad, ktp, ktp.

Kun ĉiuj, ABSOLUTE KUN ĈIUIJ, mi povis interparoli tute libere kaj mi ĉiam komprenis perfekte. Li estis tute mirigita, ĉar neniel li povis imagi, kion li vidis. Kaj post la unua kunsido de la Kunveno, li rimarkis mire, ke pri la aferoj diskutitaj partoprenis skoltoj el malsimilaj landoj kaj eĉ rasoj. Oni diskutis ilin pere de lingvo al ĉiuj komuna. Kaj ni povis nin kompreni perfekte ne bezonante interpretistojn. De nun ĉio estis klara. Tiel rekonis ĝin, li, kaj miaj kamaradoj.

Kaj tiam li parolis varme pri Esperanto. Li admiris nin ĉiujn, kiel pionirojn de bela celo, kiu iam estos ĉarma realaĵo. Li estis konvinkita pri tio. Eĉ li intencis pene rememori kelkajn duonforgesitajn vortojn por tiamaniere partopreni ankaŭ nian gajecon parolante al la fremdaj skoltfratoj. Li ekkonsciis ke ni, la esperantistaj skoltoj, estis, kiuj pli perfekte sentis fratecon kaj amon al aliaj, el la skoltoj tendaritaj tie, en Gödöllo apud Budapeŝto.

Mi nur faris unu refutaĵon. Ja, ni ne estas la pioniroj de Esperanto. Antaŭ multe da tempo jam estis semitaj la ĝermoj, kies frukton ni nun tuŝis. La esperantistaron nuntempe, oni devas kalkuli je miloj po ĉiu lando. Esperanto ne plu estas revo, sed vera realaĵo.

Tio estis pruvita de la multenombraj vizitantoj de nia Tendaro, kiuj sin direktis al ni per esperanta ligvo, anstataŭ per aliaj, kun la espero esti komprenataj.

Multaj el la hispanaj skoltoj, kiuj venis en Hungarujo kune kun mi, promesis serioze lerni Esperanton kaj poste propagandi ĝin. Ili ĉiuj estis ankaŭ konvinkitaj pri tio ke Esperanto estas nepre necesa por la internaciaj rilatoj de la skoltaro. Same estis tio rekonita de Skoltaj Asocioj el Hungarujo, Latvujo, Belgujo, ktp. Esperanto interesas multe la skoltaron. Ĉiuj veraj skoltoj devas lerni Esperanton.

A. PEDRO MARQUETA.

Hispana Agento de S. E. L.

## SCIIGOJ

Ni ricevus ĉe nia ejo viziton de Sro Kreuz, Direktoro de I. C. K. de la Esperanto-Movado. Li kontrolis la librojn de Frateco kaj honoris nin per laŭdindaj vortoj, kiujn ni tre dankis al tiu eminenta esperantisto.

En Komercesta Klubo, regalis lin per vespermanĝo, al kiu ankaŭ ĉeestis S-roj Rodriguez Escartín, Orós, Salas kaj Bruquetas; dum tiu ĉi vespermanĝo oni paroladis pri diversaj esperantaj aferoj, precipe hispanaj.

\*\*\*

Nia samideano S-ro Vicente Perles, kiu antaŭ ne multe estis destinita al Callosa de Ensarriá (Alicante), faris paroladon pri: "El Esperanto, su importancia y utilidad" ĉe "Ateneo de la Juventud"; ĝin aŭskultis multenombra aŭdantaro. Oni malfermis ĉe tiu Ateneo kurson, gvidata de S-ro Perles, al kiu ĉeestas tri naciaj instruistoj kaj kelkaj studentoj, entute dekok ĉeestantoj. Ni korege gratulas S-ron Perles.